

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

<b>Kosto de abono por jaro:</b>	<b>Pago por anoncoj:</b>
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

**II:a jaro.**

**Novembro 1897.**

**N:o 11 (23).**

## La anoj de XII medicina internacia kongreso sur bordo de l' Maro Nigra.

En tiuj ĉi lokoj, la malgranda urbeto Jalto, kuŝanta sur la suda bordo de l' Maro Nigra, havis la honoron — akcepti la alialandajn doktorojn, revenantajn de la kongreso el Moskvo. Oni decidis, ke la gastojn akceptos aparta “komitato por akceptado de la alialandaj doktoroj” kaj sinjorina komitato kies sinjorinoj devis akcepti la gastojn, kiel mastrinoj.

La venantaj en Jaltan alialandanoj dividis sin en du grupoj — la unua venis en Jaltan rekte post la kongreso kun la lokaj doktoroj; la dua grupo veturis tra Peterburg, Niĵni-Novgorod kaj Kaŭkazo.

La 20 Aŭguston (malnova stilo), venis la anoj de unua grupo, 80 personoj. Aliajn tagojn komencis malmulte post malmulte veni la anoj de dua grupo.

La gastoj estis antaŭ ĉio akceptitaj en la urba kurzalo, kie la sinjorinoj faris por ili rajton.

En vendredo estis unua ekskurzio en Hurzufon, en kiu prenis parton anoj de l' kongreso, lokaj doktoroj kaj sinjorinoj.

La tartara vilaĝo Hurzufo kuŝas sur la plej suda punkto de la bordo de l' Maro Nigra. En antikva tempo tie-ĉi estis greka fortejo “Hurzuvit”. Nun ĝi apartenas al riĉega rusa komercisto S. P. Gubonin kaj kostas 4—5 milionojn. En belega parko, en kiu trovas sin belaj floroj kaj multekostaj arboj, staras luksaj “hôtels”. Super la vilaĝo levas sin granda monto, nomita Monto-Urso, ruse “Medvjed-Gora”, ĉar ĝi efektive similas grandegan urson, submetinta sub si la piedegojn kaj klininta la kapon al la maro. Tie-ĉi, la posedanto, S. P. Gubonin, tre gastame akceptis la gastojn per luksa tagmanĝo. En la tempo de tagmanĝo jalta doktoro F. D. Veber en la nomo de kongresanoj kaj komitatanoj esprimis sinceran dankon al la gastama mastro. Poste parolis profesoro Ziffe, unu el la deputitaj de Aŭstrujo-Hungarujo, la rusaj doktoroj Ostrovsky, Druskin kaj aliaj. Fine, kiam la gastoj kolektiĝis en la

ĝardeno sub ombraj arboj, ĉirkaŭ tablo kun belaj vinoj de Hurzufo, generalo fon-Taulov, medicina inspektestro de milito kaj ŝiparo de Norvegujo, diris paroladon, kiu ravis ĉiujn. Li diris, interalie: "oni parolas, ke rusaj filoj de komercistoj ofte elspezas monojn, kiujn ili heredas post siaj patroj. Se ĉiuj filoj elspezus monojn por krei en sia patrujo tian paradizan angulon, kaj tenus ĝin tiel, kiel ĝin faras Gubonin, anstataŭ elspezi monojn en aliaj landoj, tiam oni devas deziri, ke trovu sin multe da tiaj elspezuloj."

Dua ekskurzio sin faris sur Aj-Petri; ĝi enhavis 60 da kongresanoj kun iliaj familioj.

La monto Aj-Petri, la supro de montaro Jajla levas sin je 4042 futoj super la maro, en 24 verstoj nord-okcidente de Jalta. Ĝia nomo venas de grekaj vortoj *Aj* — sankta, *Petri* — Petro kaj signifas "sankta Petro".

La vidaĵo de tiu-ĉi monto ne estas jeskribebla: ĝi estas tiel grandioza ke ĉiu, vidinta ĝin, ne povas ĝin forgesi. Tie-ĉi, 4042 futoj super la maro ĉiuj estis fotografitaj en komuna grupo. Sur la supraĵo D-ro F. D. V. diris toaston por la Augusta Protektoro de la XII internacia kongreso, ĉiuj ekkriis "hura" kaj kantis la rusan nacian himnon: "Gardu la reĝon, Di'!" La alilandanoj tuj kompozis telegramon al Lia Imperiestra Moŝto, en kiu antaŭ la reveno en la patrujon ili dankis por la Augusta protektoreco, kiu vastiĝis ĝis la plej malproksimaj partoj de l' Imperio.

D-ro Krevet en brilanta parolado jemontris la tutan vojaĝon de kongresanoj de Peterburgo tra Moskvo ĝis la supro de Jajla-montaro. "Ĝi estis rimarkinda vojaĝo: neniŭ el ni povas forgesi pri ĝi. Ni lernos al niaj fratoj kaj filoj, kiel oni devas akcepti gastojn, ni ĝin ellernis tie-ĉi! Tiu-ĉi vojaĝo ne estas ĉeno de ĝojaj festoj, ne, ĝi estas ĉeno de rimarkindaj, memorindaj tagoj, kiuj ludos gravan seriozan rolon en la kultura historio. Ni esperas ke la XII kongreso estos ligilo inter la popoloj kaj grandega faktoro de la paco. Vivu la scienco kaj tiu popolo, kiu tiel solene akceptas la filojn de la scienco!"

En la dimanĉo multe da kongresanoj forveturis tra Sevastapolo en Konstantinopel, sed venis novaj gastoj kaj la tria ekskurzio — en Alupka, estis nombra — ĝi enhavis 50 homojn.

La vojo en Alupka iras tra la reĝa bieno Livadia, kie ofte pasas la aŭtunon la Reĝa Familio kaj kie la 20 Oktobron 1894 mortis la Imperiestro Aleksandr III. Tie-ĉi la gastojn akceptis la direktestro de Livadia, generalomajoro L. D. Evreinov: li regalas la gastojn per bela vinbero, vino kaj fruktoj.

La tartara vilaĝo Alupka kuŝas sub la monto Aj-Petri. Ĝi apartenas al heredidoj de la glora princo Voroncov, kiu faris multe por Krimo. En la belega parko, kun grotoj kaj fontoj, iranta ĝis la maro per terasoj, trovas sin la grandioza palaco el Krima griza marmoro. La vidaĵo de tie-ĉi estas sorĉa. En la parko trovas sin multekostaj ekzotikaj arboj. La eniron en la palaco gardas ses belaj leonoj el blanka marmoro en diversaj situacioj. Nun neniŭ loĝas en la palaco; nur gardistoj-tartaroj montras al turistoj la belajn ĉambrojn kaj la multekostan, grandan bibliotekon de princo Voroncov.

Post rigardado de la palaco kaj parko la gastoj tagmanĝis. Estis diritaj multe da paroladoj. Profesoro Mendel el Berlin diris: "ni sciis, ke ni iras en Rusujon, en tiu-ĉi grandega regno preskaŭ sen limoj, sed tamen havanta limojn; sed en tiu-ĉi regno ni trovis tion, kion ni povas trovi nenie en la mondo — la *senliman gastamecon*. Ni trinkas por florado de tiu-ĉi luma trajto de la rusa popolo! Vivu la rusa gastameco! Hoch!"

Sekvantajn tagojn alvenadis ankoraŭ gastoj, kiuj ankaŭ estis gastame

akceptitaj. Tiu-ĉi ĝojo de akcepti gastojn kaj de alia flanko — la ĝojo de trovi gastamon montras ke en la koro de ĉiu civilizita homo estas amo al alialandano. Mankis nur io — mankis nia kara lingvo “Esperanto.”

Jalto, Rusujo, bordo de l' Maro Nigra.

Aleksandrino Bernstein.

## Novaĵoj.

En Smolensk mortis en novembro la helpanta agento de s-ro Aleks. Zakrjevski, lia kuzo, *Antonio Zakrjevski*. Pacon al lia cindro!

\* \* \*

En la “Kristana Societo de Junaj Viroj” en Karlskrona D-ro G. R. Schlyter en la komenco de novembro faris publikan paroladon “Pri la plej nova mondlingvo Esperanto”. La parolado estis simpatia por nia lingvo, kies simplecon kaj facilan ellerneblecon s-ro S. elmontris per ekzemploj.

\* \* \*

### “Espero”.

En la <sup>16</sup>/<sub>28</sub> Novembro havis lokon kunveno de membroj de l' societo “Espero”, kie post legado de kalkul-raporto, la membroj elektis F. Postnikov kiel prezidanto, K. Ostanjeviĉ — unua sekretario, P. Ĵarnovskij — dua sekretario, N. Sutkovoĵ — bibliotekisto. Sinjorino Kolpiĉeva, s-ro Burenkov kaj s-ro Alekseev estas novaĵaj membroj ene elektitaj. S-ro Ŝmurlo (inĝeniero en Tomsk kaj efektiva membro de l' societo) estis elektita kiel “honora membro” pro liaj multaj oferaĵoj en uzo de propagando lingvon “Esperanto”.

Krom efektivaj membroj en tiu-ĉi kunveno ankaŭ alestis s-ro Langlet, kiu ripozis en tiu-ĉi tempo en Peterburgo post sia longa kaj interesa vojaĝo tra Rusujo.

La membra pago estas (por 1898 jaro) unu rublo (2,5 m.) sen abono “L. I.”, kaj du rubloj kune kun abono “L. I.”.

Adreso de l' societo “Espero”: *S.-Peterburgo* (Rusujo). Sergievskaja n-ro 17, loĝ. 21.

Prezidanto *F. Postnikov*.

Sekretario *Ostanjeviĉ*.

Dua sekretario *P. Ĵarnovskij*.

\* \* \*

### Pri la filatela vortareto.

Dank' al la helpo de amiko kiu jam multe faris por Esperanto, mi povas baldaŭ eldoni la verketon specialan por filatelitoj, pri kiu mi jam parolis en tiu ĉi gazeto. Pro absoluta manko da tempo, mi devis momente forlasi tiun ĉi laboron. Sed nune mi reprenis ĝin serioze, kaj eĉ mi etendis la mallargajn limojn de mia unua projekto, tiamaniere ke mi faru el tiu ĉi libreto verkon utilan ankaŭ por la esperantistoj ne-filatelistoj. Tuj kiam la manuskripto estos revidita kaj korektita, mi sendos ĝin al la presejo; sekve mi esperas ke la verko estos preta post 6 aŭ 7 semajnoj, en la komenco de la venonta jaro. Samtempe ke ni anoncos ĝian publikigon, ni donos detalajn sciigojn pri ĝia definitiva enhavo.

Mi reatentigas la legantojn pri tio, ke en la fino, mi presigos senpgea

la nomojn kaj adresojn de la mendintoj kiuj tion deziras, kaj kiuj estas sendintaj al mi ĝustatempe la informojn necesajn: ĉiu povas aldoni al sia adreso sciigojn pri sia kolekto, pri la korespondoj kiujn li deziras, k. t. p. Tiu ĉi adresaro estos do samtempe por la kolektantoj rimedo de senpaga anonco.

Lastaj mendoj ricevitaĵ: Tsheredeer, 1 — Chavet, 1 — Burdy, 1 — Bieletzki, 1 — Brych, 1 — R. de Ziemkiewicz, 1 — Trypolski, 3 — D:ò Zamenhof, 20 — Vladikin, 1 — Kune kun la antaŭaj: 132.

*René Lemaire.*

—:~:—  
**Historio pri amo.**

(El *W. von Braun*, sveda poeto ŝercema.)

For la amon! Ĝojon donas  
Multe pli la glas' al ni!  
Pagi nun mi ne bezonas,  
Ĉar sufiĉe pagis mi  
Jam per mia am'. —  
Kiel fajra flam'  
Mi varmadis malkvieta  
Por knabin' la plej koketa.

Ĉiam mi kolektis florojn,  
Pala iris mi sen pac',  
Kunforĝadis longajn horojn  
Versaĵegojn mi sen lac',  
Kušis sur genu',  
Tranĉis sen enu'  
Sian nomon mi en ĉia  
Arbo kune kun la mia.

Sur plej bona la papero  
Multefoje pentris mi  
Nian domon de l' espero  
Sirmadatan de tili',  
Antaŭ ĝi laget',  
Tie insulet',  
For al ĝi ni remus iam  
Por ke tie soli ĉiam.

Sed la fin' de l' revo mia!  
— Trinki donu do al mi! —  
Kiam pentris mi — alia  
Venis, domon havis li  
Kune kun laget'  
Kaj kun insulet'.  
La knabin' min tuj forlasis —  
Tiel mia rev' forpasis!

**Sig. Ag.**

—:~:—  
**Larmo nur sekreta.**

Mi aŭskultis najtingalon  
Nokte maldormante,  
Najtingalo kantis kanton,  
Fajre ploregante.  
Pioris ĝi — mi ankaŭ ploris,  
Ĝemis ĝi — mi — ĝemis;  
Ĝi venontan vokis fajre,  
Min pasinta premis.  
Vokis ĝi la amikino  
Ami kaj adori, —  
Perdis mi anĝelon mian  
Por eterne plori.  
Kantis ĝi... En mia brusto  
Kanto estis preta,  
Sed elfluis el la koro  
Larmo nur sekreta...

**Dmitri Jegorov.**

## Hekale.

El rakontoj de *Per Hallström*, sveda verkisto.

Kiam Tezeo eliris por kapti la bovon Maratonan, li alvenis en la unua tago ĝis Gargetto kaj dormis tie la nokton. Li ricevis mielan vinon post la vespermanĝo kaj sidis ĝoja kaj vidis la sunon malleviĝi kaj rakontis ĝoje al ĉiuj sian farotaĵon. Ili eklevis siajn ŝultrojn kaj rigardis supren al li per grandaj okuloj. "Sed vi ne scias, kiom furioza kaj danĝera ĝi estas", ili diris, "ĝi ne estas bovo, monstro ĝi estas, sennombrajn ĝi pereigis, homojn kaj bestojn, ĝi spirblovas fajron, oni diras, kaj ĝia rigardo mortigas. Kaj vi estas sola, kaj kion do vi havas tie? — Martelegon sole, ligitan al longa ŝnurego, kion vi volas efiki per ĝi?"

Tezeo klinis sin antaŭen ridante. "Levu ĝin", li diris, "levu la martelegon! Ĉu ĝi estas sufiĉe peza? La ŝnurego estas tiel longa por sufiĉi por ligi per ĝi la beston — du turnoj ĉirkaŭ la kornoj kaj la buŝego, malsupren laŭ la brusto sub ambaŭ la antaŭaj femuroj, supren post la skapoloj kaj firma ligo sur la dorso — ĉu tio sufiĉas? Mi ne intencas mortigi ĝin, nur bati al ĝi sufiĉan baton, tiel, meze en la kapsignon kaj tiam ŝnurigi ĝin por konduki ĝin al Atenoj. Helpon mi poste povos ricevi por tiri ĝin laŭ la vojo, sed pli frue mi nenian bezonas." Kaj kiam ili penis lin dekonsili, rakontante pri ĉian teruron, kiun kaŭzis la bovo, li nur respondis: "Des pli da kaŭzo por havi baldaŭ finon de tio ĉio, bonaj homoj", kaj kiam la suno malleviĝis, li eniris por dormi.

En la sekvanta tago li atingis al Probalintus, kiam la suno staris plej alte, kaj li estis soifa kaj iom laca pro la vojo, kiu kondukis inter montetoj jen leviĝe jen malleviĝe. Ĝi komencis tamen tie ĉi esti pli ebena, kaj pro la disvasteco de la linioj de arbaroj oni povis jam antaŭsenti la grandan ebenajon de Maratono. Vidante dometon tute proksime al si, li paŝis tien supren kaj ĵetis sian martelegon sur la herbo. Tie sidis maljunulino en la pordo ŝpinante, precize tiom interne, ke la lumo de l' suno preterire tuŝetis ŝian kapon kaj ŝiajn manojn kaj varmigis ŝiajn genuojn. Ŝi rigardis lin per helaj, klaraj okuloj kaj ekhaltigis la ŝpinilon per la fingro.

"Mi estas laca, patrino", li diris, "kaj varma. Se vi volas permesi, ke mi envenu ĉe vi kaj sidu en la ombro plej densa kiun vi havas, vi faros al mi bonon."

La maljunulino tuj leviĝis kaj ŝovis flanken sian trippedan seĝon.

"Kompreneble vi envenu", ŝi respondis, "kaj estas plej bone, ke vi iru al la lito kaj ripozu kontraŭ ĝi, tie estas tirvento el la ŝovpordetoj, se mi fermas la pordon."

"Sed se mi nur scius", ŝi diris plu, "kion mi devas doni al vi manĝi, fremdulo."

Tezeo iris preter ŝi internen kaj for al la lito, kaj ĝojis ke ĝi estas pura kaj bela, malgraŭ eluzita estas la felo ŝafolana. Li sidiĝis sur ĝin, ĉar tie ne estis alia loko, kaj apogis la mentonon en la mano kaj la kubuton kontraŭ la lignaĵo. Tra fendoj en la plafono enfluadis la plej delikataj radioj kiel hareroj el la haroj de Apolono. Tezeo ridetante rigardis ilin kaj la maljunulinon, kiu sulkigante la frunton kaj balancante la kapon parolis al si mem:

"Se mi scius, kion mi devas doni al vi manĝi, fremdulo", ŝi diris denove. "Neniel pro tio ke la elekto faras al mi malfacilon, sed mi nenion havas, eĉ

ne bakis la malmultaĵon da faruno, kiun mi havas. Mi ŝpinadas lanon, vi vidas, kaj havas iri longan vojon forportante la ŝpinaĵon, kaj en la lastaj tagoj mi ne fortis iri, kaj la korbo jam estas plena je faskoj da fadeno, kaj iom da lano apenaŭ restas. Kiam ĝi estos finita, mi apenaŭ scias, kion mi faru plu. Sed estos sendube ia rimedo. Eble mi povos iri jam morgaŭ por ricevi novan lanon kaj forporti mian ŝpinaĵon, kaj ricevi farunon kaj oleon kaj eble ankaŭ alion kun mi.“

Tezeo rigardis ŝiajn brunajn manojn, kiuj sin movadis, kvazaŭ ili ŝpinus ankoraŭ — ŝajnis, kvazaŭ la flavaj radioj de suno estus ŝia ŝpinaĵo. “Vi havas ja tutan la sunon por ŝpini, patrino“, pensis li diri, sed retenis la ŝercon antaŭ ŝia afabla zorgo kaj li diris nur: “Vi havas ja akvon, patrino?“ “Ho, akvon, ĝin vi povis trinki el putoj kaj riveretoj, kie ajn vi pasis, ĝi estas nenio por doni al gastoj. Sed se vi volus — unu ion mi havas, akvan kreson, laktukon kaj iom da oleo sur la fundo de l’ kruĉo kaj salon kaj acidiĝintan vinon. Tion ĉi mi povas prepari por vi tiel bone kiel kiu ajn.“

Kaj Tezeo rigardis ŝiajn manojn, kiuj restis levitaj sub la tegmenton kaj tremis jam pro fervoro pretigi tiun ĉi manĝaĵon, kaj li ridetis.

“Kompreneble mi volas“, li diris.

Tiam la vizaĝo de la maljunulino ekglatiĝis, kiom ĝi povis pro ĉiuj sulkoj de maljuneco, kiujn ĝi portadis, kaj ŝi rapidis elpreni el granda kruĉo la kreson gutantan kaj meti ĝin en kribrilon por deakviĝi.

“Kreson tiel bonan kiel en tiu ĉi rivereto iom sube trans la vojo nenie oni trovas“, ŝi diris. “La akvo tie estas pura, neniam limakoj, neniam nigraj rampaĵetoj, kaj ĝi troviĝas tiel proksime kaj tiel riĉe, ke oni nur etendas la manon malsupren kaj prenas en tia sama maniero kiel lavinte lanon oni elprenas ĝin el la gargaro.“

“Ankaŭ, mi estas sola tie kolektanta“, ŝi finis, dum plumblovante ŝi levis sian solan pladon, sidigis sur la seĝon, kaj komencis tranĉi la kreskaĵojn — “tiel ke tian kreson, fremdulo, vi povas ricevi sole ĉe mi.“

Tezeo ridetante ŝin aŭskultis, sed rigardadis rekte supren al la flavaj strioj kaj pensadis je tagoj pasintaj kaj je tagoj venontaj, vidis ilin ĉiujn kvazaŭ de ia alta punkto, kvazaŭ estus regionoj super kiuj li flugadas simile al aglo en malrapida rondeterna flugado, kun la akra rigardo, preterglitanta duone en sonĝo.

“Kio estas via nomo, maljuna patrino“, li diris.

La maljunulino eklevis sian rigardon kaj kontentis vidi sian liton estantan tiel belan sub li. “Hekale estas mia nomo, kaj mi loĝis longtempe tie ĉi, longtempe kun aliaj, kun edzo kaj du infanoj, longtempe sola ankaŭ, post ke ili ĉiuj mortis — kaj mi amas estadi tie ĉi en mia dometo.“

Tezeo ekmalleviĝis el siaj vidoj malproksimaj kaj renkontis la helan rigardon de la maljunulino. “Kaj kompreneble vi volas scii, Hekale, kiu estas mi, kaj kial mi estas ĉi tie. Mi estas juna, kiel vi povas vidi, mia nomo estas Tezeo, kaj mi eliris por kapti la bovon sur la ebenaĵo de Maratono, tial mi havas la marteleĝon kaj la ŝnuregon, kiujn vi rimarkis, kiam mi alvenis.“

La maljunulino avertante levis la tranĉilon. “Tiun bovon“, ŝi ekvokis, “kiu estas tiel danĝera, kiu havas hufojn el kupro, oni diras, kaj kiu manĝas viandon de homoj.“

Sed kiam ŝi vidis la fortecan rideton de Tezeo, malleviĝis ree ŝia voĉo.

“Nu, vi scias ja kion vi faras kaj kion vi riskas“, ŝi finis, “kaj ĉion

tion. vi ja jam aŭdis? Nun mi volas nur deziri al vi prosperon, junulo.“ Kaj ŝi daŭrigis tranĉadi sian kreson, malofte derigardante.

Sed Tezeo per siaj vortoj portigis pli proksimen al la vidoj kaj rememoroj, super kiuj li flugadis ĵus, kaj lin amuzis paroli post tiom da horoj de soleco. Kaj li rakontis, pleje por si mem en solestarantaj sonoraj periodoj, kvazaŭ estus eĥoj de versoj el heroa kanto, kiujn li aŭskultadas kaj malrapide ripetadas, aŭ kvazaŭ estus ornamoj el bronzo kaj oro, kiujn li levas kaj lasas fali el la manoj, dum la rigardo revante laŭglitas iliajn skulptitajn scenojn.

“Mi estis jam antaŭe en aventuroj, mi estas Tezeo, la filo de Ajgeo kaj de Ajtra; kiam mi fariĝis viro, mi levis la ŝtonon, sub kiu kuŝadis kaŝita la glavo de mia patro, la ŝtonon, kiun neniu povis ekmovi.

Poste mi iris al Atenoj laŭlonge Istmos, kaj vidis la maron aletendiĝantan kaj brilantan renkonte al mi ĉe ĉiu kurbiĝo kaj ĉiu alto de mia vojo.

Tie estis kvar rabistoj, Perifetes kaj Sinnis kaj Skiron kaj Prokrustes, kaj kiu evitis *unu* sub la ŝirmo de la nokto, tiu renkontis unu el la aliaj kaj tremis pro la tago.

Sed mi ilin ĉiujn venkis, mi deziras, ke vi alestus por aŭdi la bruon, kiam mi ĵetis Skiron'on suben en la profundaĵon, kaj la profundaĵo kriegis.

En Atenoj ne rekonis min mia patro, kaj Medeja, la sorĉistino, penis depreni mian vivon, ĉar ŝi sciis mian estontaĵon. Kaj ŝi donis al mi venenitan trinkaĵon, sed antaŭ ol mi allipis ĝin, mia feliĉa sorto ŝiris ĝin el mia mano, kaj la kvindek Pallantidojn, kiuj ribelis kontraŭ mia feliĉo, mi venkis.

La maljuna virino, sin okupante per sia aranĝado, ne ĉion komprenis, ŝia aŭdo jam ne estis bona, sed la sonoro de la voĉo ŝin kaptadis, kaj tempe post tempe ŝi turnis al li sian vizaĝon kaj siajn helajn okulojn.

“Vi estas juna kaj forta kaj bela“, ŝi diris, “estas agrable rigardi vin.“

Sed Tezeo daŭrigis:

“Tie malsupre sur Kreta“, li diris, “estas ia erarirejo, kien multaj postsignoj de piedoj kondukis internen sed neniam eksteren. Tie estas vindanta mallumo, kiu ĉirkaŭkaptadas, tie estas la terurego plej interne en la formo de monstro. Tien mi baldaŭ iros kaj liberigos de ties potenco la mondon.

La maljunulino ekhaltis enmovadi sian salaton, kaj rigardis lian kapon kaj ŝultrojn, kien la radioj defaladis en maldikaj kordoj, kvazaŭ li tenus la liron de l' dio de suno, kiel li kuŝadis apogante sin.

“Eĉ la morton mem intencas vi do venki, fremdulo“, ŝi diris. “Faru ĝin do rapide, ĉar mi estas maljuna.“ Kaj tuta ŝia malgranda bruna vizaĝo ridetis en admirado je lia beleco kaj forto.

“Jen“, ŝi finis kun rideto ankoraŭ pli gaja, “jen estas preta mia kreso. Ĉu vi volas nun akcepti tion solan, kiun mi povis ek trovi por doni al vi?“

Tezeo sin levis sidante kaj prenis la pladon. “Volonte, Hekale“, li diris.

Ŝajnis al li, ke neniam antaŭe tiel bonan kreson li manĝis, tiel refreŝigantan kaj acidetan, li ĉion elmanĝis, kion preparis la maljunulino, kaj ŝi rigardadis ĝoje kaj fiere. Fininte li leviĝis.

“Dankon, Hekale“, li diris, “via kreso estis ankoraŭ pli bona ol vi diris al mi. Nun mi estas ripozinta kaj refreŝigita, nun sendube estas tempo, ke mi iru kaj kaptu la bovon.“

Kaj li enrigardis en ŝiajn helajn okulojn kaj super ŝin ronde ĉirkaŭten en la dometo kun ĝia malhelo kaj ĝia suno, kaj li ametis ĉion, kaj ĝojis jam je la penso reveni returnonte. Tiam li puŝe malfermis la pordon kaj eliris en la lumon.

Kiam li sin returnis ĉe la vojo, la maljunulino sidis ree sur sia seĝo ŝpinante kaj rigardis post lin.

Sed Tezeo alvenis al la ebenaĵo Maratona kaj eliris rekte tien, kie pli alta ĝi estas, por ke la bovo povu vidi lin de malproksime kaj esti allogita.

Ĝi estis tiel kaj venis, eksterordinara kaj nigra, suspekteme strabante, furioza kaj piedfrapante la teron. Tezeo deligis la martelegon kaj elordigis la ŝnuron, dum la monstro en krozoj proksimiĝis al li. "Tio ĉi estos por mi ludo kaj ekzerco por la batalo kontraŭ Minotaŭro", li pensis, kaptis la martelegon kaj lasis la baskon de l' mantelo elfirti — ĝi havis striojn purpurajn. Tiam la besto mallevis la kornojn kaj venis.

Tezeo cedis flanken kiel en danco, kiam la malamiko estis proksime antaŭ li, ekbatis per la martelego ĝian kapon, sed ne sufiĉe forte, denove venis ĝi, furioza kaj sangon spirblovante, denove Tezeo cedis flanken en danco kaj ekdonis baton al ĝi. Post ke tio ĉi estis ripetita kelke da fojoj, la monstro kuŝis surdigita.

Tiam ligis ĝin Tezeo, kiel dirinta li estis, kaj post tio li metis la manojn al sia buŝo kaj laŭte ekvokis.

El la arbaro elvenis fine homoj, kiuj ŝteliĝis laŭlonge la ebenaĵo, ili dubis kaj esploradis, ĉu ĝi estas krio je helpo, kiu sonas tiel gaja, vidis tiam la bovon venkitan kaj proksimiĝis, nedecideme ankoraŭ.

Sed Tezeo montris al ili, ke ĝi estas ligita, kaj ekkaptis ĝian kapon, kiu komencis ree movi sin kaj ŝanceliĝi, kaj ricevis ilian helpon por konduki ĝin kun si. La monstro konsciis, ke ĝi estas venkita, strabis kontraŭ la teron kaj nur malfervore kaj senforte kontraŭbatalis.

Ĉar la suno lumadis nun super la ebenaĵon per malaltaj, flavaj radioj, oni povis de malproksime vidi la gracian kaj altan figuron de Tezeo, kiel ĉi tiu interbatalis kun la besto, pligrandigataj ambaŭ en la lumo kaj oni komprenis el la ludo de liaj moviĝoj, ke estas venkinto la tie staranta.

"Estas sendube la sundio mem", oni diris, "estas Hélios mem, kiu venis malsupren por helpi al ni!"

Kaj la sciigo disvastiĝis, kaj oni venis kurante de malproksime kaj haltis timete, kaj exploreme rigardis kun la mano kiel ŝirmilo kontraŭ la vespera lumo. Kaj vidinte, ke estas junulo, ne dio, ili alvenis tute apud lin. Tiam Tezeo iris en la plej proksiman vilaĝon por ripozi, antaŭ ol li kondukis sian venkitaĵon al Atenoj.

La tutan tagon sekvantan li restis tie ĉe festo kaj kanto kaj danco, kaj en la posta mateno li iris hejmen kun multa anaro akompananta.

Kvin junuloj kune kun li mem kondukis lian venkitaĵon, kaj knabinoj kaj knaboj ligis kronon de folioj por lia kapo, kaj ĉirkaŭ la kornojn de l' bovo ili vindis oferajn vindaĵojn. Ili ankaŭ akompanis kaj iradis egalmezure, kaj antaŭveninte, ili haltis kaj atendis ĉe dancado, ĝis la irantaro atingis ilin, kaj aligis sin ĉirkaŭ la manhelan amason, kiel blankaj ondoj ĉirkaŭ ŝtonego, kaj kantis, kaj Tezeo mem kantis.

Pri okazoj pasintaj kaj danĝeroj venkitaj li kantis kaj pri venontaj okazoj, kiuj atendadis la sonon de liaj paŝoj.

Iam post iam li pensis je Hekale kaj ridetis je la penso vidi ŝin denove kaj je ŝia miro pro lia heroaĵo.

Kiam li venis proksime al ŝia dometo kaj vidis ke la pordo estas fermita, li vokis al la du plej belaj knabinoj:



“Kuru tien supren vi ambaŭ kaj frapu, kaj kiam la pordo estos malfermata meze en la sunlumo, tiam kliniĝu kaj diru, ke nun alvenas Tezeo, ŝia kara amiko. Hekale estas ŝia nomo.”

Ili kuris tien supren kaj stariĝis ĉiu sur sia flanko de la pordo, klinis siajn delikatajn kapojn unu kontraŭ la alian, etendis supren en arko la brakojn kaj frapis.

Iliaj blankaj piedkoloj kaj tibioj helis kontraŭ la ŝtono, iliaj riĉefaldaj vestoj helis, ili staris kiel figuroj sur ia urno kun oreloj. “Hekale!” ili vokis per voĉoj sonoraj, “elvenu! Tezeo, via kara amiko, alvenas.”

Ili kredis, ke ŝi estas knabino kiel ili, kaj iliaj okuloj brilis pro scivoleco. Kiam ne tuj fariĝis respondo, ili metis la vangon al la fosto kaj aŭskaltis kaj atendis ridetante, sed venis neniam respondo.

“Hekale!” vokis ili ankoraŭ unu fojon, kaj iliaj voĉoj fandiĝis unu en alian kiel ludo de kordoj agorditaj. “Hekale, venu!”

Sed Tezeo lasis sian tenon en la ŝnurego al du aliaj kaj iris sur la dekliveton.

“Sendube ŝi dormas”, li diris.

Li malfermis la pordon mallaŭte kaj mallaŭte eniris, kaj la knabinoj streĉis sin post li por vidi.

Tie kuŝadis la maljunulino en sia pura bela lito kun la vizaĝo alturnita eksteren kontraŭ la lumo, tiom glata kiom ĝi povis esti pro la sulkoj de maljuneco, kaj afabla, kaj kvietaj, kaj ili komprenis tuj, kiel tio ĉi estis.

“Ŝi estas morta, via amikino Hekale”, ili diris kaj sekvis lin internen kaj metis la branĉetojn, kiujn ili tenis per la mano, en arkaĵo super ŝian kapon.

Kaj Tezeo alvidis ŝin kaj fermis kviete ŝiajn palpebrojn kaj poste rigardis ŝin longe kaj ĉion malmultan, kio estis la ŝia, la dometon kun la suno tra la tegmento kaj la doman uzajon kaj la seĝon tripiedan kaj la korbon plenan je faskoj de fadeno. Poste li diris:

“Ŝi estas morta, mia kara amikino Hekale, kaj sendube neniu estas por doni al ŝi enterigon. Estas do mi, kiu devas ĝin fari en danko por la bela gastamo, kiun ŝi donis al mi.”

Kaj dum la knabinoj lavis kaj ornamis la korpon, Tezeo eliris por prepari lignaron de bruligo, kaj al la kunuloj li diris:

“Ligu la bovon longe malproksime, ĉar nun ni restos ja tie ĉi unu plentagon, kaj por vi estos sufiĉe da laboro min helpi.”

Post tio ili alportis lignon el la arbaro kaj elektis lokon por la bruligo kaj sendis venigi kruĉon da vino kaj kelkajn brulantajojn kaj urnon; kaj kiam ĉio estis preta, ili suprenportis la mortintinon sur portilo de branĉoj de tilio, metis ŝin supre sur la amasoj de ligno, kovris per branĉoj kaj ekfajris la flamon, dum la knabinoj staris silentaj kaj seriozaj.

Kiam la fajro unuiĝis super ŝi, Tezeo ŝprucetis en ĝi vinon el la kruĉo kaj klinis sin al ŝi kaj parolis:

“Dankon, Hekale”, li diris, “dankon por via gastamo kaj la rideto kiun vi havis por mi kaj la refreŝigo kiun vi preparis. Vi estis ĝoja loĝi en via dometo kaj sidi en la suno kaj lasi vian afablecon lumadi renkonte al la preteriranto.

Nun mi favorigas por vi la potencojn de Hades, por ke vi ne devu eraradi tie ekstere, sed estu enlasita en la palan landon. Tio ĉi ne estas multa, Hekale, sed ĉio, kion mi povas fari en rekompenco je tio, kion vi

donis. Kaj via memoro vivados longe, per festoj mi solenos vian belan gastamon.“

Dum ankoraŭ la vino sufiĉis, li ĝin ŝprucetis sur ŝin, kaj kiam la lignaro estis elbrulinta, li kolektis ŝian blankan cindron kaj volvis ĝin en grandajn foliojn kaj metis ĝin en la urnon, kaj por la urno li preparis ripozejon tute proksime sur altaĵo apud la vojo.

Tio ĉi okupis tutan la tagon kaj vesperon, en la nokto ili dormis tie, la knabinoj en la dometo de Hekale, la junuloj ekstere en la malvarmeto, kaj en la mateno sekvanta ili ree komencis sian iron al Atenoj, dancante, kantante, kondukante kun si la venkitan monstron.

Trad. Paul Nylén.



## La kranioj.

El "Versaĵoj en prozo" de L. S. Turgenev.

Bela, hele lumigita salono; multe da sinjoroj kaj sinjorinoj. Ĉiuj vizaĝoj estas ĝojaj, parolado iras vive. Oni parolas pri konata kantistino. Oni nomas ŝin dia, senmorta . . . Ho, kiel bone ĝi faris ŝian lastan trilon. Sed subite — kvazaŭ laŭ movo de sorĉa bastono — de ĉiuj kapoj kaj vizaĝoj forflugis la maldika haŭto kaj subite eliris eksteren la morta blankeco de la kranioj, ekbrilis per blua plumbo la nudaj dentoj. Kun teruro vidis mi, kiel moviĝis tiuj-ĉi dentoj, kiel turnis sin, brilante en lumo de lampoj kaj kandeloj la ostaj globoj kaj kiel moviĝis en ĝi aliaj malgrandaj globoj — globoj de senpensaj okuloj.

Mi ne kuraĝis tuŝi mian vizaĝon, ne kuraĝis rigardi en spegulo. Kaj la kranioj turnis sin ĉiam . . . Kun krako montris sin per ruĝaj rubandoj el nudaj dentoj rapidaj langoj, parolante, kiel mirinde, kiel neimiteble la senmorta, jes, senmorta kantistino faris sian lastan trilon.

Aprilo, 1878.

Aleksandrino Bernstein.



## La Baleno.

Sveda humoresko de Falstaff.

Tradukis P. Nylén.

Tio ĉi estas historio pri plendo kaj teruro kaj mizero kaj malfeliĉo kaj doloregoj. Ĝi estas instrua, ĉar ĝi montras al ni, ke la vivo estas mizerejo, en kiu neniu scias, kie la leporo havas sian iron. La "leporo" tiun ĉi fojon tamen estas baleno. El tio ni lernas, ke la vivo ne estas nur mizerejo, sed ankaŭ enigmo. Plimulte homo neniam bezonas lerni.

Tiu ĉi historio eĉ eble estas vera. Sed se *tio* estas fakto, tiam la pereco de l' mondo sendube estas sufiĉe proksima, kaj tial estas tute necesa legi tiun ĉi historion kiel eble plej bladaŭ, dum jam ankoraŭ estas tempo.

Se la mondo tamen pereis, antaŭ ol vi finigis la legadon, rapidu sciigi min pri tio per la poŝto, por ke mi sciu precize, de kiu vorto mi devas daŭrigi, kiam ni en tia okazo nin revidas ie — vi sendube antaŭsentas en kia loko!

Ĝis tiel fariĝas — viŝu viajn okulvitrojn, metu la dekstran genuon super la alian kaj legu!

1.

Okazis iam antaŭ multaj jaroj, ke du malriĉaj viroj en unu bela tago de printempo iris sur la bordo de l' maro, disputante, per kia maniero ili gajnus monon kaj rapide fariĝus riĉaj. Ili laborege laboradis dum tiel longa tempo por gajni iom pli ol tiom, kiom estis bezona por ĉiu tago, sed ŝajnis tute neeble. La tempoj estis malbonaj, kaj tiel estis ankaŭ niaj du viroj. Ili estis malbonaj, kompreneble, nur dank' al tio, ke la tempoj estis malbonaj. Tiel ofte okazas en malbonaj tempoj! Krom tio, unu havis la nomon Sen, la alia nur Petrofilo.

"Se mi nur havus monon!" ekdiris Sen.

"Kion vi tiam farus?" respondis Petrofilo. "Ĉu eble vi tiam invitus min trinki bieron?"

"Jes! — Jes! — mi volas diri — mi ne certe scias!" — opiniis Sen, kiu el la vivo lernis esti terure singardema.

"Fi je l' diablo, kiom vi estas avara!" diis Petrofilo kaj kraĉis sur la teron.

Kaj ili daŭrigis sian iradon; tiu malgranda d'sputo faris ilin ankoraŭ pli malkonsentaj kaj pli emaj vidi ĉion en peĉa nigreco.

"Ĉu vi scias?" diris subite la unu kaj ekhaltis.

"Ne?"

"Mi ekhavis ideon!"

"Kion do?"

"Mi min dronigos! Tiel oni estos libera el la tuto."

"Ĉah!" diris la alia. "Tio eble ne estas malsaĝa ideo! Mi konsentas!"

Sekve ili nun estis pacigitaj kaj iris tial interkonfide kun brako en brako kaj en tre bona humoro en la akvon por plenumi sian komunan decidon.

La maro tamen ĉe tiu bordo estis tre longe malprofunda, kaj pro tio ili devis iri sufiĉe longan spacon, ĝis la akvo superis iliajn pantalonojn. Subite la akvo komencis esti pli profunda, kaj ili esperis jam esti proksime al sia celo, kiam Petrofilo ŝanceliĝis, falis kaj senerare dronus, se ne Sen kun alesto de konscio lin retiris el la akvo.

"Dankon", Petrofilo diris ekscitita. "Vi savis mian vivon — mi ĝin neniam forgesos!"

"Ĝuste!" respondis Sen kun nobla fajro en siaj okuloj. "Sed sur kio vi faletis?"

"Mi ne scias — ni rigardu!"

La ambaŭ amikoj sin klinis kaj okuladis.

"Estas ŝtonego!" diris Petrofilo.

"Ne!" ekkriis Sen, kiu estis pli zorgema esploranto. "Ne, Petrofilo, neniel estas ia ŝtonego, estas, kontraŭe, baleno, kaj nun nia feliĉo estas farita!!!"

2.

Montriĝis ankaŭ efektive, ke estas mortinta baleno, kiu kuŝis tie ĉi en la akvo de l' bordo. Per terura ventego enpelita sur la malprofundaĵon, la kolosa mizerajo ne fortis deveni returne el la loko, sed mortis pro manko de akvo. Ĝi estis ankoraŭ tute varma: estis klare, ke la morto fariĝis nur antaŭ kelkaj minutoj.

Post ke la ambaŭ amikoj venkis sian ekscitecon kaj deviŝis kelkajn lar-

mojn de ĝojo, ili sidigis kun brako en brako sur la malvarmigantan supran makzelon de la baleno kaj komencis kalkuladi.

Ili estis ambaŭ en plena klareco pri tio, ke la baleno reprezentadas riĉon. La du amikoj tial malpaciis, komence, pri tio, kiu el ili efektive posedas la balenon. Petrofilo certigis, ke ĝi estas lia, ĉar la dronigo estis lia ideo.

Sed Sen montris, ke estas li, kiu malkaŝis, ke ĝi efektive estas baleno; kaj, krom tio, ĉar Sen estis pli forta, Petrofilo konsentis, ke ili partigu inter si la trovaĵon.

“Jes, nia feliĉo estas farita!” ripetis Sen. “Antaŭ ĉio ni konduku la balenon en la urbon. Tie ni montru ĝin por alta kosto de bileto. Post tio ni vendu la ostaron al la plej riĉa muzeo de l' ŝtato kaj el la felo ni lasu pretigi multajn centojn da paroj da botoj — sole per la botoj ni povos gajni almenaŭ du mil frankojn!”

“Jes, pri tio ne estas dubo! Kaj per la ostaro...”

“*Dek mil!* Kaj per biletoj?...”

“*Kvindek mil!*”

“Jes almenaŭ! Se ni prenas nur po duona franko por ĉiu bileto, kaj se cent mil homoj venas... — — ... tiam estas klare, ke se venas 100,000 homoj, ni havas 200,000 frankojn!”

Nun ili komencis kalkuli erare kaj svenetis pro riĉeco, kaj interdecidis finigi la kalkuladojn, por ne freneziĝi pro ĝojo. Ĉar Sen, kun sia antaŭ-videmeco, montris, ke se ili estus frenezaj, ili ne havus okazon plenumi eĉ partumeton de siaj intencoj.

Tio estis tiel saĝa montrito, ke ili decidis tuj konduki la balenon sur la bordon — por ke ili per io komencu.

Sed *kiel* tio fariĝu? Ili decidis atendi la tempon de la alfluo, kiu ĉe tiu feliĉa bordego ofte faris duonajn mirindaĵojn.

Tiel ankaŭ nun okazis. Grandega ondo de la alfluo portis ilin ĝis alte sur la teron, rekte antaŭ la domo, kie ili loĝadis, kaj la baleno estis ankaŭ portita tien supren per la ondo alflua, ĉar tiu ĉi estis precipe forta tiun ĉi fojon.

### 3.

Kiam la tago sin klinis kontraŭ la vespero, la ambaŭ kuraĝaj ĉasistoj de baleno sidis sur herba benko ekster sia dometo kaj ĝuis duoble je la sorĉa rigardo al la baleno, dum ili trinkis por la prospero unu de la alia en bongusta *toddi* \*), kiun Sen prosperis provizi dank' al la kredigo, ke baldaŭ li heredos de unu nepo en Sud-Ameriko.

La anima stato de la du amikoj estis tamen tre malegala. Dum Petrofilo kun sia ordinara flegmo de bovo ĝuis je la ekzistado, alterne karesante la balenon, alterne replenigante sian *toddi*, Sen iradis turne kaj returne, videble laborante pro ia penso, kiu ne volis lasi lin en paco.

Subite li ekhaltis, rapis sin sur sia senhara frunto kaj kriis furioze:

“*Mi trovis ĝin!*”

“Kion do?” ekkriis Petrofilo terurigita.

“*Mi trovis ĝin!!* Aŭdu nur: kiel al ni estus, se ni *ne* povus vendi la ostaron kaj la botojn?”

\*) Trinkajo, kiun oni preparas el konjako kun akvo kaj sukero: solvante tri pecojn da sukero en duona glaso da varma akvo plenigota per konjako

“Tiam ni estos do malriĉaj kiel antaŭe“, opiniis Petrofilo subite senkuraĝita.

“Ne — *neniel*, ne, *neniel*! Ĉar...“

Li sin interrompis, rigardis singardeme cirkaŭen kaj klinis sin super la streĉe aŭskultantan orelon de Petrofilo...

Kaj en tiu orelo estis nun subdirita la plej abomeninda projekto, kiu estis iam elŝpinita sur la tero. Petrofilo komprenis kaj aprobis la projekton. La maro resonis pro la kruda rido de la du malaltanimaj homoj. La suno subiris, ruĝa pro honto pri la mallaŭdindeco de la ambaŭ viroj.

Sed ili daŭrigis trinki sian *toddi* kaj ĝojegi pri sia komuna malnobleco, ĝis ili endormiĝis apud la flanko de la senkulpa baleno.

4.

La suno de la sekvanta semajno briladis sur ia interesa vido en la proksima grandurbo. Meze sur la placo, meze inter la magistrato kaj la preĝejo kaj la banko, levis sin, nome, parada, per flagoj ornamita ligna konstruaĵo sur kiu oni legadis tiun ĉi elpendaĵon:

Tio Ĉi Estas Montrata  
**LA BALENO!**  
la plej granda en la mondo!  
Pezas 180,000 funtojn = 192,000 kilogramojn.  
Mezuras de la kapo al la vosto 150 metrojn, kaj de la vosto al la kapo 158 metrojn.  
Tute sendanĝera eĉ por la plej malgrandaj infanoj (kaj servantoj)!  
Kaptita post  
**Furioza batalo** meze en la maro.  
1/2 da biero 20 centimoj, 1 butero-pano 15 centimoj.

Tio lasta estis “pufo“ por la restoracio, kiun Sen kaj Petrofilo instalis en la okcidenta angulo de la konstruaĵo.

La ligna konstruaĵo estis farita de vendisto de ligno, kiu havis la promeson je unu kvinono de la gajno kaj krom tio ricevis bileton rajtigantan por la tuta tempo de la montrado. La vendisto de ligno manovradis ankaŭ por la sama pago dum du horoj ĉiutage la manilon de gurdo ekster la ŝirmkonstruaĵo, meze inter Sen kaj Petrofilo, kiuj sidadis vendante biletojn. La vendisto de ligno turnadis la manilon laŭ ĉiuj siaj fortoj, sed alvenis tamen tiom terure malmulte da homoj, ke ĝi apenaŭ sufiĉis por la ĉiutagaj elspezoj. La vendisto de ligno bedaŭrigis kaj postulis sian monon. Sen rediris, ke li havas ja sian konstantan bileton.

“Kion plu?“ diris la vendisto de ligno.

“Kion plu?! Tio ĉi estas ja pura gajno por vi! Se vi eniras kaj rigardas la balenon ekzemple 30 fojojn ĉiutage, tio ĉi valoras ja la saman kiel 15 frankojn, ĉar ĉiu bileto efektive kostas duonan frankon! Ĉu vi ne povas vivi kaj nutriĝi je 15 frankoj ĉiutage?“

“Jes, sed ne *tiaj* 15 frankoj“, diris la vendisto de ligno, kaj li volis ĝustan monon. Li ne povas vivi, sole rigardante mortintan balenon, diris la vendisto de ligno kaj ekĵetis sian ĉapon sur la teron.

“Trankviliĝu!“ respondis Sen kun terura rideto. “*Estos do iam somero...*“

La vendisto de ligno penis trankviliĝi; kaj fine aperis la somero...

(Daŭrigota.)

## Respondo je la propono de s-ro Zakrĵevski.

(N-ro 8—9 L. I.)

Je la propono de s-ro Zakrĵevski oni povas rimarki: 1) ke l' agento de la lingvo Internacia Esp. ne devas esti malfaciligita per multaj kondiĉoj: per nomiĝo "agenteo" li volas nur anonci al ĉiuj, ke li volas ne sole sciigi kaj sin uzi de "L. I." sed ankoraŭ fari ion por amata afero; oni povas sendube konsili al li, sed ne ordoni. La pago por agentado estos ankaŭ stranga fakto: ĉar jam sen tiu-ĉi pago agenteo portas pli multe da elspezoj je mono kaj tempo, ol aliaj esperantistoj. Mi ne povas kompreni, pro kio s-ro Z. pensas, ke agenteo devas esti pli riĉa ol aliaj esperantistoj!

Krom tio-ĉi mi devas ankoraŭ aldoni, ke la fino de l' propono de Z. estas tute ne leĝa: se iu proponas ion, kio ne surmetas sur aliaj homoj ŝuldojn, tiam li povas konkludi: se oni ne respondos al mia propono mi ĝin kalkulos akceptita, sed se li proponas tion kio ŝuldigas aliajn personojn, li ne povas fari tiun-ĉi konkludon, la povas nur diri: kiu min konsentas aliĝu al mi, kaj nur se la nombro de aliĝintaj al li estos pli multa ol ne aliĝintaj, li povas anonci ke lia propono estas akceptita.

Se ni imagas, ke ĉiu proponas, kion li volas, kaj ke se oni ne respondos je lia propono, ĝi estos akceptita, tiam tio-ĉi signifas ke ĉiu aparta homo povas eldoni regulojn kaj senigi la rajtojn de aliaj homoj, laŭ sia deziro!


Ne, mi ne povas konsentiĝi nek kun la propono de s-ro Z., nek kun la formo de lia propono.

S. Postnikov.

\* \* \*

Mi ne povas aliĝi al la propono de s-ro Zakrĵevski al la agentoj en la lasta numero de L. I., sed mi tute konsentas al la aldono tie farita de s-ro P. Nylén.

D-ro I. Asklöf.



## Informejo de esperantistoj.

### Ŝanĝitaj adresoj de niaj abonantoj:

S-ro R. H. Geoghegan. 906 North N. Street. Tacoma, Washington. Unuigitaj Statoj. Ameriko.

### Korespondadi kun alilandanoj deziras:

S-ro Zakrĵevski petas, ke ni presu la sekvantan:

Por la Smolenska librejo mi ricevis 40 ekz. da "Kain" mistero de lord Byron, kaj 10 ekz. da Regularo de la Soc. esp. "Espero" en S.-Peterburgo. Tiujn ĉi librojn oferis al mi tiu sama societo. Koran dankon al Ĝi! En tiu ĉi okazo mi ankoraŭ petas ĉiujn aŭtorojn kaj tradukistojn esperantajn, ke ili *volu sendadi po kelkaj ekz. da iliaj verkoj al mia librejo*. Adreso mia konstanta estas sekvanta: "Smolensk (Rusujo) oficerskaja sloboda, domo Erdeli, al agenteo de Esperanto Aleksandro-Zakrĵevski".

Esperantistojn el la Smolenska gubernio kore mi petas sendadi al mi raportojn pri ilia agado, por ke mi povu raportadi en "L. I." pri la propagando de Esp. en la tuta Smolenska gub. Kaj ankaŭ mi petas ilin, se kiu deziras esti helpanto de l' Sm: a agenteo, volu turni sin al mi.

\* \* \*

Unu rusa junulo de 19-jaroj, bone komprenanta lingvon "Esperanto", antaŭ unu monato komencis lerni francan lingvon. Li tre petas junajn geesperantistojn de Francujo helpi al li lerni suprenomitan lingvon per konsiloj, skribitaj por unua fojo en Esperanto. Leterojn oni volu adresi: Jaroslavl. Dom Spaso-Probojnskoj Cerkvi al agente de Esperanto I. Ŝirjaev por transdoni al P. M. O. I. Ŝirjaev.

"Antaŭ nelonge mi ricevis leteron el Elisavetgrad (gub. de Herson) de unu juna, sed varmega amiko de nia afero s-ro G. Slucki. En tiu ĉi letero s-ro Slucki petas min sciigi ĉiujn amikojn de Esperanto, ke en lia urbo krom li estas nur unu esperantisto kaj ke li deziras propagandadi nian lingvon en Elisavetgrad; sed ne posedante sufiĉan monon por tiu ĉi afero, li ne povas atingi dezirindan celon. Tial li petas ĉiujn verajn amikojn de Esperanto sendi al li subtenon aŭ per ia sumo da mono, aŭ per rusaj lernolibroj, kaj cetraj esperantaj libroj.

Mi esperas, ke niaj amikoj ne rifuzos kaj helpos al bona afero de propagandado de nia kara Esperanto en Elisavetgrad, sendante ian sumon da mono aŭ librojn — ĉiu kion posedas.

La nomoj de oferintaj personoj estos presitaj en "Lingvo Internacia". Oferojn oni volu sendi rekte al s-ro Slucki: Elisavetgrad (gub. de Herson). Al s-ro G. D. Slucki. (Rusujo). Agente de Esperanto I. G. Ŝirjaev.

### "Bagateloj."

**Mark Twain** (Maak Tŭeĉin) unufoje volis "ilustracii" publikan paroladon, kiun li faris pri la Sandŭic insuloj. Parolante pri la tiea antikva moro manĝi homojn, li proponis nome montri, kiamaniere tio fariĝis — se iu el la sinjorinoj alestantaj volis prunti al li infaneton dum kelkaj momentoj. P. N—n.

"**Granda fajrego** aperis dum la lasta nokto en la X-a strato. Dektri homoj kaj unu tajloro enbrulis."

**Maldelikate.** Juna virino ravanta: — Ah, sinjoro profesoro, kion dirus tiu ĉi maljuna kverko, se ĝi povus paroli.

— Ĝi dirus: "Pardonu, mia estimata sinjorino, mi estas tilio".

— Ĉu vi havas ankoraŭ ĉiujn dentojn, mia sinjorino?

— Kial vi demandas tiel strange, mia sinjoro?

— Ĉar mi ne povas kompreni, kiel en tia malgranda buŝo 32 dentoj trovas lokon.

## ANONCOJ.

**M**i komencis kolekti Evangeliojn de tuta mondo kaj estos kore dankaj al ĉiu, kiu sendos al mi Evangelion de sia patrujo aŭ por mono aŭ por ŝanĝo de io.

**Al. Bernstein.**

Jalto, Rusujo, Krivo, Aŭtska strato,  
d. Kruman.

**K**orespondi kun filologie spertaj esperantistoj pri la sintakso de Esperanto, precipe koncerne la *scio pri la ptenfrazo* (= eldiro) — kion mi en esperanto kunskribis, sed ĝis nun ne havis okazon prilabori — deziras

**Paul Nylén, Uppsala.**

**La gazeton Lingvo Internacia oni abonas:**

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
  - „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
  - „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
  - „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio, Pontevedra, *Silleda*.
  - „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
  - „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, *Odessa*.
- Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.  
En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

**Sinjoro N. Arduin**

komercisto en Bordeaux, 11 rue Turenne, Francujo, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de siaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinbereco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon de l' produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

**Moskva Esperantista Rondeto**

invitas Moskvajn kaj aliajn esperantistojn kaj ĉiujn, kiuj konsentaj al progresado kaj disvastigado de l' Lingvo internacia Esperanto fariĝi membro de tiu ĉi Rondeto. Oni povas esti membro efektiva kaj membro korespondanto. Membra jarpago 1 rublo. Rondeto donas al siaj membroj eblecon korespondadi kun amikoj de nia lingvo, korektigas iliajn provojn en Esperanto, donas ĉiujn necesajn informojn kaj posedas sufiĉe grandan bibliotekon.

Prezidanto: **V. Fedorovski**.  
Sekretario: **Henri Tastevin**.

**Eldonoj de societo "Espero":**

2) **"KAIN"** de lord Bajron. Traduko de A. Kofman.

1 fr. = 70 öre = 80 pfen. = 40 kop.

3) **"JARLIBRO ESPERANTISTA DE 1897"**. Jubilea eldono.

1 fr. = 70 öre = 80 pfen. = 40 kop.  
Rabato: ĉe 100 ekz. = 40 proc., 50 ekz. = 20 proc.

La libroj estas riceveblaj de societo "Espero" en Peterburgo.

**Nova vortaro. Esperantisk-svensk Ordbok,**

**Vortaro Esperanto-sveda**  
de **P. Nylén,**

eldonita de Klubo Esperantista en Uppsala.

Kostas kr. 0,75 (= fr. 1,10).

Rabato, kiam oni aĉetas kelkajn ekzemplerojn.

Ricevebla de

Klubo Esperantista en Uppsala.

**Enhavo de tiu ĉi numero.**

	Paĝo.
<i>Medicina kongreso ĉe Maro Nigra, de Al. Bernstein</i> . . . . .	161
<i>Novajoj</i> . . . . .	163
<i>Historio pri amo, de Sig. Ag.</i> . . . . .	164
<i>Larmo nur sekreta, de D. Jegorov</i> . . . . .	164
<i>Hekale, de P. N—n (trad.)</i> . . . . .	165
<i>La kranioj, de Al. Bernstein (trad.)</i> . . . . .	170
<i>La Baleno, de P. N—n (trad.)</i> . . . . .	170
<i>Respondo je la propono de s-ro Zakrjjevski</i> . . . . .	174
<i>Informejo de esperantistoj</i> . . . . .	174
<i>Anoncoj</i> . . . . .	175